# NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jmgiaa@gmail.com)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
esperantobi@gmail.com
TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €.
**KUTXABANK(BBK)-konto. Kodo IBAN: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**JANUARO/MARTO 2017** **Nro. 110 (1/17)**

Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo

**La 100ª mortodatreveno de Ludoviko Zamenhof**
Solenata sub la aŭspicio de UNESKO

## Logosigno de Unesko por Zamenhof-Jaro 2017.

La 14-an de aprilo 1917-a mortis en Varsovio Ludwik Lazar Zamenhof, la kreinto (aŭ "iniciatoro", kiel li ŝatis diri) de Esperanto. Okaze de tio, UEA kaj la diversaj landaj asocioj organizas diversajn agadojn. Dume, laŭ informo de Barbara Piętrzak (04/02/2017), oni atingis disponigon de logosigno fare de UNESCO:

"*Zamenhof-Jaro jam dauras. Multaj iniciatoj jam okazis. Kiel mi jam informis pasintjare lige kun la Jaro Unesko disponigas specialan logosignon, kiun oni povas utiligi en ĉiaj agadoj ligitaj kun la datreveno solenata sub la auspicio de Unesko.*

*Sekve de nia vizito en la pola Unesko-Komitato pasintsemajne (kun Barbara Despiney) ni ricevis ĝin en kvin lingvaj versioj: Esperanto, krome en la lingvoj pola, angla, franca kaj hispana.*

Ankaŭ en **Hispanio**, sub la regado de HEF, jam estis organizitaj diversaj kunmemoraĵoj pri la figuro de Zamenhof. La unua estis ekspozicio pri Esperanto, inter la 11a kaj 24a de januaro, en la Kultura Spaco de la Publika Biblioteko Clara Santiró i Font en Valencio. Alia, kunlabore kun la Pola Instituto pri Kulturo, en Vallecas (Madrido). La 2an de februaro, la prezidanto de HEF prelegis pri Dro. Zamenhof, lia verko kaj ideoj, en la Centro Sefarad-Israel de Madrido… Kaj al tiuj sekvos multaj aliaj agadoj. Informo pri tio en *http://www.esperanto.es/hef/index.php/komenco/38-noticias-esperanto/noticia/333-komencigas-la-jaro-zamenhof-en-hispanio*.

**LOKE ...**

## Zamenhofa Festotago.



Kiel anoncite, la pasintan 17-an de decembro, ni renkontiĝis ĉe nia E-rondejo por kunmemori la naskiĝtagon de la kreinto de Esperanto kaj la internacian tagon de la E-libroj.

Ĉirkaŭ 15 homoj atentis pri la alvoko kaj, kiel kutime, post mallonga prelego, eblis interparoli ĉirkaŭ tablo plenplena de la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj alportitaj de la ĉeestantoj.

La ege amikema etoso prokrastigis la adiaŭon ĝis preskaŭ la 11-a nokte.

## La lotería de Navidad, premiada.




rio. Ili aĉeteblas en nia sid

Por fin, después de muchos años, la lotería de Navidad del Grupo resultó premiada, a razón de 20 € por cada papeleta. Si aún queda alguien que no haya cobrado el premio, que se ponga en contacto con nosotros. A finales de Marzo se cumplirán los 3 meses de plazo que, habitualmente, se dan para el cobro. Naturalmente, no se hará ningún pago sin la presentación de las papeletas.

A comienzos de Marzo se va a organizar un **nuevo curso de Esperanto** en nuestra sede. Si alguien conoce a alguna persona interesada, que se lo comunique para que se ponga en contacto con nosotros o bien acuda a la sede del Grupo para recibir más información.

## Historia kuriozaĵo.

**Antaŭ 80 jaroj...** Unu tagon post la komenco de la hispana intercivitana milito, la 19-an de julio 1936-a, en Bilbaoa ĵurnalo aperis jena anonco pri prelego en la E-Grupo:

(Tradukita) *”PRELEGO -------------- ESPERANTA GRUPO DE BILBAO Morgaŭ, lundon, je la oka vespere, kaj en la sidejo de tiu ĉi asocio (strato Iturribide, numero 6, 1-a etaĝo), okazos ilustrita prelego pri Svislando kaj la svisa folkloro, fare de niaj samideanoj sinjorino Zimmermann kaj sinjoro Attila Dubicola, kiuj jam troviĝas inter ni. Tiu ĉi prelego disvolviĝos en Esperanto kaj la eniro estos malferma al ĉiuj, kvankam estas speciale invititaj tiuj, kiuj konas la internacian helpan lingvon."*


*(El la retpaĝaro de la E-Grupo de Bilbao. https://sites.google.com/site/esperantobi/home)*

## CUOTAS DEL AÑO 2017.

Cuando queráis, podéis hacer el pago de vuestra cuota anual. El número de cuenta está en la primera página de este “Nia Ponto”. Y no olvidéis **las cuotas vigentes**:

Cuota normal: 60,00 € anuales. (5 € al mes)
Cuota familiar: 70,00 € anuales. (5,83 € al mes)

## Frostas en nia sidejo.




Tiu-ĉi foto estas farita la 20-an de januaro en nia sidejo: termometro indikas 8 gradojn.

Spite de tio, Esperanto varmigas la korojn de niaj plej aktivaj samideanoj, kiuj deĵoris tie ĉiujn vendredojn de la ĉi-jara malvarma vintro.

Baldaŭa alveno de printempo certe helpos al pli komforta laborado.

Malgraŭ tio, ne timu viziti nian sidejon. Ni atendas vin ĉiujn.

## VENONTAJ E-ARANĜOJ.

**23-25 jun. 2017**. Kongreso de Hispana E-Federacio (HEF) en Teruel.

**22-29 jul. 2017**. Universala Kongreso de Esperanto, UK-2017 - en Seulo, Suda-Koreio. Inf.: x, rete: - Retejo ĉe UEA: http://www.uea.org/kongresoj/

**5-12 aŭg. 2017**. IJK, Internacia Junulatra Kongreso - en urbo Aneho en Togolando.

**25-31 jul. 2018**. Universala kongreso en Lisbono (Portugalio).

**H.E.F.**

## "DON QUIJOTE", EN ESPERANTO, EN INSTITUTO CERVANTES.

La 15an de decembro, en la Internacia Tago de Esperanto, Hispana EsperantoFederacio publike prezentis en la centra sidejo de la Instituto Cervantes, en Madrido, la elektronikan eldonon de la traduko al Esperanto de "La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha".

La evento komenciĝis je la 7a vespere en la sidejo de la Instituto en strato Alcalá, 49, Madrido (enirejo per la strato Barquillo). Ĝi estis prezentata de la direktoro de kulturo de la Instituto Cervantes, Beatriz Hernanz, kaj en ĝi partoprenis José Antonio del Barrio, prezidanto de Hispana Esperanto Federacio, Miguel Gutiérrez Adúriz, verkisto en Esperanto kaj kunordiganto de la projekto de bitigo de la verko, kaj Ana Manero, respondeculo de la Bitoteko de HEF. Fine de la aranĝo okazis donacado de serio de libroj en Esperanto al la biblioteko de la Instituto Cervantes.

Kiel vi scias, tiu bita eldono estas disponebla en la Bitoteko de HEF, en la adreso http://www.esperanto.es/quijote

*("Nia Voĉo", órgano de Madrida E-Liceo. Decembro 2016)*

## JAM EBLAS ALIĜI AL LA 76 HISPANA KONGRESO EN TERUELO.




Kiel ni anoncis en pasinta Bitbulteno, Hispana Esperanto-Federacio decidis ke la 76a Hispana Kongreso de Esperanto okazos de la 23a ĝis la 25a de junio 2017, en urbo Teruelo (Aragono). La Loka Komitato kaj la grupo "Liberanimo" jam laboras en la organizado de la evento, kaj renkontis la urbajn aŭtoritatojn, kiuj decidis inkludi nian renkonton ene de la programo por la celebrado de la 800 datreveno de La Amantoj de Teruel, la loka legendo kiu estas kvazaŭ simbolo de la urbo.

Ni memorigas ankaŭ ke la renkonto okazos la jaron kiam ni kunmemoros la 100an datrevenon de la forpaso de D-ro Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto, kaj la 130an de la eldono de la Unua Libro.

Oni baldaŭ diskonigos la unuajn detalojn pri la programo kaj aliajn informojn, inklude de la agadoj programotaj antaŭ aŭ post la kongreso mem. Dume, jam eblas aliĝi al la kongreso. Oni povas tion fari per tiu ĉi formularo: www.esperanto.es/kongresaligo.

*("La Bitbulteno" de HEF. Nro. 32. 30/11/2016)*

Je la fino de februaro jam estis **74 aliĝintoj**, do supozeblas ke ĝis junio ankoraŭ alvenos pliaj aliĝiloj kaj ke la teruela kongreso estos unu el la plej multnombraj de la lastaj jaroj.

## MIGUEL FERNÁNDEZ, NOVA PREZIDANTO DE LA BELARTAJ KONKURSOJ.



Du hispanaj E-verkistoj estas la novaj gvidantoj por la Belartaj Konkursoj de UEA. Nia samgrupano Miguel Fernández estos la prezidanto, dum la kantabriano Miguel Gutiérrez Adúriz estos la sekretario.

Pliajn detalojn kaj iliajn biografiojn vi povas legi en la gazetara komuniko de UEA: http://uea.org/aktuale/komunikoj/2016/Novaj_gvidantoj_por_la_Belartaj_Konkursoj_de_UEA.

*("Nia Voĉo", órgano de Madrida E-Liceo. Decembro 2016)*

## La k-disko Esperanto kandidatas por la titolo "Plej bona rok-disko de la jaro".

Kiel vi scias, la 6a k-disko de la hispana rok-bando Cronómetrobudú, lanĉita pasintjare kaj sukcese akceptita en Hispanio kaj en Meksiko, nomiĝas *Esperanto* kaj en ĝia 7a sontrako aŭskulteblas la kanto *Luna*, en kies fina parto aperas la voĉo de Miguel Fernández en deklamado de la zamenhofa poemo *Ho, mia kor!*

La sukceso estas tia, ke la k-disko *Esperanto* ricevis kandidatigon por la titolo "Plej bona rok-disko de la jaro". La kantisto de la ensemblo, Javier Castro, sin turnis al ni kun la peto ke ni esperantigu kaj distrumpetu laŭeble en Esperantujo la manieron kontribui al la atingo de la premio per reta voĉdono.

Jen la peto fare de Javier Castro:

*Geamikoj, saluton al ĉiuj.*

*Per via apogo, antaŭ kvar jaroj nia tiama k-disko sukcesis akiri la titolon "Plej bona rok-disko de la jaro", kaj ĉi-jare ni volas akiri ĝin denove. Unu plian fojon disko nia ricevis kandidatigon al tiu titolo, kaj ni petas vin alporti vian briketon al nova sukceso jene: eniru en la ligilon, kiun ni proponas al vi, registriĝu kaj voĉdonu por nia disko nomata ESPERANTO. Tio ŝtelos de vi nur du minutojn de via valora tempo, kiuj por ni tre gravas. Elkoran dankon: Javi, Óscar, Pablo kaj Pablo.*

*PAŜOJ FARENDAJ POR VOĈDONI:*

*1-Alklaku la ligilon kaj registriĝu per viaj retadreso kaj donitaĵoj:*
*http://www.premiosmin.com/publico/register*

*2-Turnu vin al via enir-kesto aŭ al via spam-kesto, aliru al la mesaĝo, kiun la responsuloj de la MIN-premioj sendis al vi, kaj alklaku la ligilon.*

*3-Vi jam troviĝas en voĉdono. Serĉu MEJOR ALBUM ROCK [kies signifo estas "plej bona rok-albumo"], kaj alklaku. Serĉu nian k-diskon,* Cronómetrobudú – Esperanto*, kaj elektu la respondan fakon. En la plej malsupra parto, vi vidos la opcion "VOTAR"[esperante "voĉdonu"].*

*4-Vi sukcesis 🎉🎉🎉🎉. Koran dankon tial, ke vi dediĉis al ni parton de via valora tempo!!*

*Se vi volas kundividi kun ĉiuj viaj geamikoj ĉi informon, vi faros al ni grandan servon.*
*Gigantan brakumon el la teamo Cronómetrobudú!*
*Ĉu vi ankoraŭ kredas, ke rokbando ne povas surprizi vin?*
*Salutojn kaj dankon!*
*Javier.*

*(Miguel Fernández. 09/02/2017)*

## Loteribileto de la hispanaj blinduloj dediĉota al Zamenhof.

Kun granda ĝojo ni povas informi vin ke ni ricevis konfirmon ke la ONCE (la organizaĵo por hispanaj blinduloj) decidis dediĉi loteribileton (la faman "cupón") al Dr. Zamenhof, okaze de la datreveno de lia morto en tiu ĉi jaro 2017. Konkrete, la dato selektita estos la **12a de aŭgusto**.

Grandan dankon al nia amiko Pedro Zurita, kiu faris la demarŝojn, pro lia granda sukceso.

*(José Antonio del Barrio (HEF). 10/02/2017)*




Jen la antaŭa bileto, kiun O.N.C.E. dediĉis al Dro. Zamenhof, la 17-an de majo 2008-a, okaze de la "Internacia jaro de la lingvoj".
Sendube, la eldono de nova bileto estas grava atingo ĉar ĝi estos disvendata tra la tuta Hispanio.


## Forpasis Santiago Mulas.

Ni ricevis jenan malgajan novaĵon:

"Mi komunikas al vi ke pasintan sabaton, la 11-an ĉi-monate forpasis Santiago Mulas Gallego, kiu dum kelkaj jaroj estis prezidanto de Astura Esperanta Asocio.

Pri lia laboro favore al Esperanto estas informo en la numero 84-a de nia revuo HELECO**,** publikigita en la jaro 2009 okaze de la Centjaro de tiu E-Asocio".

*(Faustino Castaño (Gijón). 15/02/2017)*




## Komenciĝas la Jaro Zamenhof en Hispanio

Jam ekas la diversaj eventoj organizitaj de HEF por kunmemori la 100-an datrevenon de la morto de L.L. Zamenhof

## Adhesión, por internet, a la Federación Española de Esperanto.

Ahora, más sencillo: puedes hacerte socio en línea, en el formulario que hemos preparado en: **http://www.esperanto.es/inscripcion**

Además, los nuevos miembros que se apunten antes del final del año recibirán una colección de los últimos ejemplares de nuestra revista.

*(José Antonio del Barrio. 16/11/2016)*

## TRA LA MONDO ...

## ĈIUJ VERKOJ DE ZAMENHOF, LEGEBLAJ EN LA RETO.

Lige al la 100-a mortodatreveno de Zamenhof, la viena Esperanto-Muzeo celis ĉi-jare prezenti ĉiujn verkojn de Ludoviko Zamenhof, aperintaj ĝis 1930, kiuj troviĝas en ilia kolekto. 125 libroj jam estas libere kaj senpage legeblaj en la retejo de la muzeo IEMW. Kelkaj ankoraŭ sekvos dum la venontaj semajnoj.

Verkoj (1887-1930) de Ludoviko Zamenhof:
https://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/ludwik-l-zamenhof/

*(Lingvo-Studio/Szilvási László, LS" <ret-info@eventoj.hu>. 02/02/2017)*

## APERIS NOVA VERSIO DE ANDROIDA "RE-VO".

Kio estas PReVo? - PReVo estas portebla versio de la libera, esperanta "Reta Vortaro, Re-Vo" por androido, t.e. por tabulkomputiloj kaj poŝtelefonoj. Ĝi estas uzebla sen retkonekto kaj ĝi estas rapide serĉebla per la klavaro. PReVo estas libera kaj senpaga programo. La aktuala versio estas 0.14. – PRevo estas havebla el Google Play - aŭ vi povas elŝuti ĝin rekte ĉe http://busydoingnothing.co.uk/prevo/
La androidan version prizorgas Neil Roberts, kontaktebla per "bpeeluk@yahoo.co.uk" .

*(Lingvo-Studio, www.eventoj.hu. 27/11/2016)*

## Esperanto-Numismatika Asocio (ENA).

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, estis fondita en 2013 la probable ununura fakgrupo **“Esperanto-Numismatika Asocio”( ENA)** kun revuo “**Esperanta Numismatiko**” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldonij katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum nur tri jaroj ĝis 58 individuaj membroj kaj 16 esperantaj organizaĵoj, bibliotekoj kaj muzeoj, dise en la mondo. Agrable estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial **oni rajtas SENPAGE aliĝi** ( sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”) kaj krome **la *NUR PERRETA* revuo ankaŭ estas tute SENPAGA**! Kaj tio neniam ŝanĝos!

Post aliĝo, vi tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn kaj sekve ĉiujn aperontajn numerojn.(4 n-roj jare).

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en Jarlibro 2016 sur p. 67. Se vi deziras pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: **bert.boon@skynet.be**!

Vi rajtas unue peti provnumeron!
Bert Boon, Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

*(PIRLOT, Germain. 24/01/2017)*

## DUOLINGO KIEL APLIKAĴO.

La furora kurso por lerni Esperanton en la reto, atingis duan ŝtupon en sia versio el la hispana: ĝi nun estas atingebla kiel aplikaĵo (apo) en telefonoj kaj tabuletoj. Post malmultaj tagoj, oni rimarkis grandan kreskon en la nombro da homoj kiuj komencis la kurson. En la nuna momento jam pli ol 32.000 homoj registriĝis en la kurso de Esperanto.

Vidu la ligilon, se vi interesiĝas: https://www.duolingo.com/course/eo/es/

Ni jam rimarkis krome ke pluraj homoj kiuj lernis per tiu ĉi metodo jam alproksimiĝis la la grupoj, al la sociaj retejoj, aŭ aliĝis al la Federacio. Bonvenon al ĉiuj!




*(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 34. 27/01/2017)*

## NOVA REDAKTORO-PARO POR LA REVUO "ESPERANTO".

Unuafoje en la historio de la revuo Esperanto, ĝi oficiale havos du redaktorojn, la geedzan paron **Dima Ŝevĉenko (31) kaj Anna Striganova (29)**. Tiel decidis la Estraro de UEA, kiu intervjuis ankaŭ du aliajn bonajn kandidatojn por sekvi Attila Kaszás en tiu grava posteno.

Ni estis tre impresitaj de la propono, per kiu Dima kaj Anna kandidatiĝis, komentas la prezidanto de UEA, Mark Fettes. Ili kune disponas pri granda gamo de kapabloj, ne nur pri la enhava redaktado, sed ankaŭ pri grafiko kaj enpaĝigo kaj pri la reteja flanko de la revuo. Tiu kombino de fortoj ŝajnas al ni tre promesplena.

Ambaŭ homoj laboras partatempe ĉe la prestiĝa Rusia Universitato de Amikeco inter la Popoloj en Moskvo, kie ili studis ĵurnalismon (Dima) kaj literaturon (Anna) ĝis nivelo de magistriĝo kaj jam preparas doktorajn disertaciojn por defendo. Ĉe Dima, denaska esperantisto, la diplomverkoj ĉiam rilatas al Esperanto kaj ĝia loko en la mondo de amaskomunikiloj. Interreto grave rolas en ilia nuntempa laboro, ĉu en praktika laboro pri la retejo de la Filologia Fakultato, ĉu kiel instrutemo kaj esplorobjekto. Kvinjara laboro ĉe la rethotela kompanio “masterhost” donis al Dima multajn teknikajn konojn sur tiu kampo.

En Esperanto, ili estas konataj kiel la **gvidantoj de la grava eldonejo Impeto,** kiun fondis en 1992 la gepatroj de Dima, Aleksandr kaj Elena Ŝevĉenko (kune kun Dimitrij Perevalov). De tiu tempo la eldonejo aperigis pli ol 300 librojn en Esperanto kaj la rusa lingvo.

Anna kaj Dima transprenos la revuon ekde la aprila numero 2017. Kune kun la preparado de sia unua numero, ili planas krei **modernan retejon de la revuo**.

*(laŭ gazetara komuniko de CO de UEA. Lingvo-Studio, L.S. www.eventoj.hu)*